

Nº 03 1970

G.L. GINELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti





IFEA

## DANKOJN PRI NIA 22-a I.F.E.F.- KONGRESO

Post la streĉa laboro, finita nia 22-a IFEF-Kongreso, mallonga paŭzo. Dum tiu ĉi paŭzo mi persone, kaj en la nomo de L.K.K. sentas la devon danki ĉiujn instancojn kaj personojn, kiuj helpis nin okaze de la kongreso kaj de la malfacilaĵoj kiuj akompanis ĝin.

Unue, varmegajn dankojn al "Dopolavoro Ferroviario" de Bologna kaj Rimini, al "Azienda Autonoma di Soggiorno" kaj al Komunumo de Rimini, kiuj per siaj helpoj ebligi la realigon de la kongreso. Sed la plej elkorajn dankojn mi devas direkti persone al S-ro Ceci, Prezidanto de "D.L.F." de Bologna, kaj al mia edzino Delvina, Sekretariino de L.K.K, veraj motoroj de la organizado antaŭ, dum, kaj post la kongreso. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj, almenaŭ unu foje dum la kongreso, bezonis ilian helpon kaj ricevis ĝin malavare.

La klopodoj de la Kasisto S-ro Catena permesis ke ĉiuj financaj kontoj, malgraŭ la ĥaosaj tagoj de la alveno de la gekongresanoj, estu bonege kontrolitaj kaj registritaj.

Danke al S-ro Franco Tangianu kune kun F-ino Dehas kaj mia filo Gianluigi, okazis la junularaj aranĝoj; ĉiuj el ili, tre helpis antaŭ kaj dum la kongreso.

Pri la bonsukcesa fakprelego ni dankas varme Inĝ-ojn Lattanzi kaj De Rosa pro la verkado, kaj D-ron De Salvo pri la tradukado kaj prezentado.

La teatraĵon ni ŝuldas al F-ino Zacconi kiu streĉe laboris por tiu aranĝo. La ekskurson al Bologna ni organizis laŭ sugesto de Profesoro GIUNGI kaj de la Urbestraro de Castel San Pietro Terme, kiuj ege klopodis por doni al ni neforgeseblan tagon.

La postkongreso en Romo, okazis danke al la klopodoj de D-ro Menabene kiu venkis ĉiujn malfacilaĵojn por efektivigi tiun bonegan aranĝon.

El la profundo de la koro mi dankas gesinjorojn Pennazio. La Gazetara Servo estis mirinda kaj ĝustatempa kaj danke al la klopodoj de la geedzoj Pennazio nia 22-a havos eĥon daŭran.

Pro la bonega loĝiga servo mi devas danki la Turisman Sekcion de DLF en Rimini kaj ĝian Prezidanto Rag.Spina.

Varmege mi dankas S-ron Greutert, kiu kvankam havus neniun devon aŭ taskon, dum tagoj li helpis nin, forprenante la horojn de la dormo kaj manĝo.

Multaj aliaj sindonaj samideanoj helpis nin: S-ro Barbieri, gesinjoroj Casagrande, S-ino Ceci, D-ino Gabrielli, S-ino Carioli, gesinjoroj Gamberini, S-roj Corso, Tarlindano, Ferrero, D-ro Boschin, geedzoj Amadei, S-ro Righi, k.t.p.. Mi timas forgesi iun, pro tio mi pardonpetas.

Al ĉiuj , niajn plej profund-korajn dankojn.

La L.K.K.- Prezidanto: p.i.Germano Gimelli

## RESUMA KRONIKO PRI XXII INTERNACIA KONGRESO DE I.F.E.F. EN RIMINI

Multaj el la anoj de I.F.E.A. ĉeestis en Rimini de la 16-a ĝis la 22-a de majo, kaj sendube konas detale la okazintaĵojn de XXII Internacia Kongreso de I.F.E.F.; aliaj, malhelpataj ĉeesti, povas peti la tri bultenojn esperantlingvajn, aperigitaj de "gazetara servo" de la Kongreso; tiuj bultenoj estas sufiĉe detalaj, pro tio, en tiu-ĉi paĝoj, ni publikigas nur resumon de la okazintaĵoj, senorde, laŭ tio, kion nia rememoro instigas al ni.

-Unua rememoro: majesteco de inaŭguro en palaco "Arengo" (Rimini) kaj imponeco de definitiva fermo de la Kongreso en salonego de "Varmbanejoj" de Castel San Pietro Terme. Ambaŭkaze ne mankis aro da aŭtoritatuloj neesperantistaj; rilate ĉi-lastajn, ni mencias la paroladojn de Senatano Zanini (dum la inaŭguro), kiu volis paroli "kiel instruisto, civitano kaj reprezentanto de italaj Popolo kaj Senato" por bonvenigi kaj gratuli la Kongresanojn, kaj (dum la fermo) de Prezidanto de "Ente Provinciale Tu-

rismo" de Bologna, kiu multe laŭdis la agadon kaj intencojn de Esperanto-Movado.

-Dua rememoro: la...strikoj! Multaj kaj neatenditaj (fare de aŭtobus-kondukistoj, benzin-vendistoj, italaj fervojistoj, poŝtoj, neŝtataj publikaj administrejoj, ĵurnalistoj, k.t.p.) preskaŭ ĉiutage minacis nuligi gravajn programerojn, kiel ekskursoj aŭ similaj. Precipe en tiuj kazoj, oni konstatis la lertecon de L.K.K. (mi, kiu verkas ĉi-resumon, ne estis LKK-ano), precipe de geparo Gimelli kaj de estro de bolonia D.L.F., s-ro Ceci, bonsukcesintaj venki ĉiujn barojn. Ekskursoj al Respubliko San Marino, al Ravenna kaj al Castel San Pietro Terme okazis, kaj precipe havis multe da bonsukceso.

-Tria rememoro: la gajeco! Ĝenerala kaj ĉiutaga, ĝi superregis la tutan tempon de la Kongreso. Eĉ dum la kongreslaboroj, neniam okazis parolbataloj; ankaŭ la malsamaj ideoj aŭ intencoj estis ĉiam konigataj ne nur per bonedukaj manieroj sed per bonhumora trankvileco (kaj tio ne ĉiam okazas dum kongresoj!). Precipe bonhumoro kaj ĝojo regis dum ĉiuj aliaj manifestacioj: bonhumore oni akceptis pluvon -kiam ĝi falis, kaj pluvego estis tiu dum inaŭguro de Zamenhof-strato en Castel San Pietro!- kaj gaje oni ĝuis la sunon, kiu tamen estis la plej ofta. Dum bela vetero, en liberaj horoj, la plej "nordulo j" el la kongresanoj taksis sufiĉe varma la klimaton, kaj permesis al suno kisi ties korpojn horizontalajn sur la sablo de la vastega Rimini-a strando. Plejparto el la "sud-eŭropanoj" opiniis, ke taŭga klimato por nudiĝi sur sablo estas en junio-julio-aŭgusto, kaj sufiĉis al ili longaj promenadoj en la senfina (plurajn kilometrojn) ĉe-stranda aleo, kie estis vere interesigaj centoj kaj centoj da ĉiuspecaj vendejoj kaj sama kvanto da kafejoj, bierejoj, kukfarejoj (triumfo de italaj specialaĵoj "pizza" kaj "piada"). Bonhumoriga estis posttagmezo, kiam okazis fama piedpilkludo; gaja la vespero dum kiu oni vere ĝuis iujn horojn da bel-kanto pro la ĉeesto de mirige lerta ĥoro "Canterini di Romagna". Tiu konata Ĥoro konigis al anoj de 19 landoj kortuŝajn kaj spritajn kanzonojn de tradicia Romagna, kaj popolajn dancojn, ne nur de Romagna sed ankaŭ de Venecio kaj Bergamo.

Tamen vera eksplodo de vivĝojo okazis dum la oficiala Balo de la Kongreso; unue, ĝi okazis en vere taŭga medio, nome en klubo "Antika Fattoria" (Malnova Biendomo), kie arkitekturo kaj meblaro kvazaŭ sentigis nin en kabano de Tortuga...; tie bona orkestreto amuzigis nin dum pluraj...pluraj horoj; fakte, mi kiu nun verkas, lasis la batalkampon je la tria de la sekvanta mateno, sed ankoraŭ iuj grupoj de germanoj kaj hispanoj (krom iom da alilandanoj miksitaj) firmkore plue sidadis antaŭ glasoj de vino aŭ biero. Mia lasta vidaĵo: kvar kongresaninoj sidantaj antaŭ ses (jes sinjoro: ses!) boteloj da "spumante". Super ili, en aera palafita kabaneto, blonda svedino -bonŝance ne kongresanino- estis preskaŭ detruanta per kisegoj iun lokan "latin-lover".

Dum la balo, rimarkinda la hispana gekongresanaro, kiu konigis nin propraokule kia estas vera, popola fandango, ĉu dancata ĉu kantata.

La orkestreto kontentigis ĉiujn ludante muzikojn el ĉiuj landoj.

-Kvara rememoro: triumfo de filatelio! L.K.K. trafe mendis por la daŭro de kvar tagoj la starigon de poŝtoficejo interne de la Kongresejo, kun speciala poŝt-stampo; miloj kaj miloj da bildkartoj aŭ leteroj, ornamitaj bele per tiu multe ŝatata poŝt-stampo ellasis Rimini por atingi ĉiujn landojn. Dum kvar tagoj, regis febro kaŭzita de "filateliaviruso"; bonŝance, je la kvina tago, ĉiuj resaniĝis. Nur la dekstra brako de la poŝtoficisto ankoraŭ hodiaŭ ne estas resaniĝanta; tamen la esperantistaro bonkore volis konsoli lin...donacante al li Esperanta-lernolibron! Kortuŝe.

Aliaj rememoroj: centojn, milojn, ĉiuj belaj; kiel rakonti la tuton? Estas neeble; pro tio, se Vi permesas, mi finas.

Nun, oni pensu alXXIII I.F.E.F.- Kongreso en Maribor (precipe Vic-prezidanto Gvozden Sredić estos kontenta pri tio).

Lastan fojon salutas Vin la zorginto de Kongresa Gazetara Servo,

Renato Pennazio.

N.B.- Mi ne estas fervojisto; tamen, se iu dubas pri mia taŭgeco verki pri fervojaj aferoj, li sciu (kaj poste silentu), ke mi dum longaj jaroj (16) estis abonanta la Italajn Fervojojn kaj, pro ĉiutaga kvarfoja vagonarvojaĝado dum tiu longa periodo, mi faris multajn utilajn kaj interesigajn spertojn pri ĉio ajn rilatanta la fervojajn aferojn...(same oni diru pri alia 50% de Gazetara Servo, nome pri Maria Teresa Pennazio).

## TUTTAGA EKSKURSO AL BOLOGNA KAJ CASTEL SAN PIETRO TERME

Kun senpacienco kaj varma deziro ni atendis la lastan tagon de la Kongreso, nome la tuttagan ekskurson, kiu devus esti, en niaj pensoj almenaŭ, la pinto de la Kongreso. Ni ne antaŭvidis strikojn nek pluvon en tiu tago. Bedaŭrinde ĉio iris alimaniere. Ne okazis fervoj-striko en nia departemento, sed ĝi okazis en la proksima de Firenze, pro tio la Fervojoj el Bologna luprenis preskaŭ ĉiujn aŭtobusojn el la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj por konduki la vojaĝantojn, alvenintajn en Bologna, ĝis Florenco. Apenaŭ ni sukcesis lui tri, kiuj alkondukis nin, en du vicoj al Castel San Pietro Terme. Tie anstataŭ la suno,ni ĝuis pluvegon, precipe en la ĉefa momento de la strat-inaŭguro.

Ĉio do, sajnis kontraŭ nin: bonŝance la bonega tagmanĝo kiun ni ricevis en la restoracio de la Varmbanejoj mildigis iomete la bruldoloron de la seniluziigo.

Striko kaj pluvo ne permesis al ni montri la belecojn de Bologna kaj de ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kiel ni intencis fari, al niaj karaj gegastoj, pro tio ni donas rendevuon al ili alian fojon esperante en pli favoraj cirkonstancoj.

Mallonga kroniko: Kiam la unuaj aŭtobusoj alvenis al Castel San Pietro Terme, la gepartoprenantoj disiĝis per la stratetoj de la mezepoka urbeto ĝis tagmeze kiam oni iris je la komenco de la nova strato "D-ro L.L.ZAMENHOF", atendante ĝian inaŭguron. Bedaŭrinde dum tiu solena momento la pluveto fariĝis pluvego kaj la gepartoprenantoj, kune kun la lokaj aŭtoritatoj kaj studentoj, kuris sub la apuda portiko.

Tuj poste, dum iu paŭzo de la pluvego,ĉiuj renkontiĝis ĉe la salono de la Komunumo kie la Vic-urbestro Dalla Valle kaj nia Prezidanto Giessner faris la salut-paroladojn kiuj per la eksterordinara pluvego ne povis okazi dum la strat-inaŭguro. Poste en la sama salono oni regalis nin per aperitivoj kaj vermutoj.

Dum la bongusta tagmanĝo en la salono de Varmbanejoj, daŭrigis iliajn paroladojn, Prof-ro Giungi, Direktoro de la loka Hospitalo, kaj nia Prezidanto. Tiuokaze estis tre interesa ankaŭ la parolado de D-ro Remo Contini, Prezidanto de "Ente Provinciale per il Turismo" de Bologna kiu multe laŭdis kaj altetaksis la Esperantan agadon.

Delvina Gimelli

## RAPORTO PRI LA ROMA POSTKONGRESO

78 Kongresanoj partoprenis la postkongreson organizita de la Roma Grupo. Belega vetero kaj...neniu striko favoris la disvolviĝon de la programo. Ĝi antaŭvidis turistajn rondojn, per privataj aŭtobusoj, de la ĉefaj monumentoj, preĝejoj kaj karakterizaj lokoj de la urbo.

Sabaton la 23-an la Skabeno Prof-ro Mazzarello, akceptis oficiale en "Campidoglio" la kongresanojn gviditaj de S-ro Walder, estrarano de I.F.E.F., kaj de D-ro Menabene, Prezidanto de la Roma Grupo. Interŝanĝo de donacoj konkludis la akcepton.

Dimanĉon la 24-an oni celebris en Sankta Petro, meson en Esperanto auspicie al unuiĝo de Eŭropo. Poste la kongresanoj eliris en la placon Sankta Petro portante grandan afiŝon kun la skribo "Esperanto". Tie ili unuiĝis al la mult-nombraj ĉeestantoj por aŭskulti la paroladon de la Papo.

Alberto Menabeno

## 12-a EŬROPA FERIOSEMAJNO EN SVISLANDO

La sukcesoj en la du lastaj jaroj kuraĝigis la respondajn funkciulojn de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF) realigi la 12-an Eŭropan Feriosemajnon en Svislando (EFS) refoje en la ĉarma feriejo GWATT ĉe la lago de Thun de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1970. La belega situo kaj la bonega kuirejo de la feriohejmo garantias pri agrabla restado kaj la zorgeme elektitaj ekskursoj al la mondfama montarregiono "Berna Oberlando" signifos por partoprenantoj de ĉiu aĝo kaj profesio neforgeseblan travivaĵon. Detalan informilon kaj senkostajn bildprospektojn oni petu ĉe la sekretario:
Ernst Glättli, Laurstrasse 17, CH-5200 BRUGG (Svislando)

## KROZAD-KONGRESO TRA MEDITERANEA MARO

LA ITALA KONGRESO SUR ŜIPO.

Originalan nacian kongreson organizos Itala Esperanto-Federacio sur granda ŝipo "CARIBIA" (24.520 tonelоj), de la 19-a ĝis la 26-a de septembro 1970. La ŝipo forlasos Ĝenovon kaj atingos laŭvice Cannes, Barcelonon, Palma de Majorca, Bizerton (Tunizo), Palermon, Capri (Napoli), kaj revenos al Ĝenovo. La malfermo de la kongreso okazos en Ĝenovo antaŭ la forveturo kaj, en la sama urbo, oni aranĝos gazetaran konferencon ĉe la "Teraso Martini". Dum la tuta semajno oni invitos sur la ŝipon ĵurnalistojn kaj radio-televidajn raportistojn.

Dum la haltoj en la diversaj havenoj, interesaj ekskursoj kaj renkontiĝoj pliriĉigos la kongresan programon.

Favora rabato obligos partopreni la kongreson elspezante nur 69.000 it.lirojn, ĉio inkluzive, kun aranĝo en 4-lita kajuto turist-klasa. Gejunuloj (ĝis 25-j.) ĝuos kroman rabaton kaj pagos entute 54.000 it.lir. Por eksterlandanoj la kongresa aliĝo estas senpaga. Petu informojn ĉe: Torina Esperanto-Grupo, 41-a Itala Kongreso de Esperanto - Casella Postale n-ro 198 - I-10121 TORINO.

## PROGRAMO PRI LA ESPERANTO FERIO SEMAJNO EN WEZEP (NEDERLANDO)

Sabaton la 29-an de aŭgusto: La partoprenantoj kunvenas ĉe la ĉefelirejo de la stacidomo de Zwolle je la 16-a horo; forveturo per speciala aŭtobuso al la feriloko "Ijsselheide" en WEZEP (8 km.).
Dimanĉon la 30-an: Interkonatiĝtago; promenado en la arbaro k.t.p.
Lundon la 31-an: Ekskurso per aŭtobuso al Flevoland (iama "suda-maro")
Mardon la 1-an de septembro: Ekskurso per aŭtobuso al parkmuzeo en Arnhem.
Merkredon la 2-an: Aŭtobusekskurso tra la provinco Friesland.
Ĵaŭdon la 3-an: Aŭtobusekskurso al la "Nordoostpolder".
Vendredon la 4-an: Aŭtobusekskurso al Zwolle, Giethoorn (la Venecio de Nederlando) kun boatekskurso kaj la folklorplena vilaĝeto Staphorst.
Sabaton la 5-an de septembro: Per trajno al Amsterdam, Ŝipveturo tra la kanaloj kaj vizito al la Ŝtata muzeo.

La prezo por ĉi tiu feriosemajno estas: ned.gld. 125,-; la ekskursoj estas enkalkulitaj escepte: la fervojbileto de via hejmo al Zwolle kaj Amsterdam. La partoprennombro estas limigita ĝis 80 personoj.

Ĉiujn informojn donas al vi la organizanto: Thies M.Blaaw, Begoniastraat 2, ZWOLLE (Nederlando). Protektas kaj subtenas: ĉefestraro FERN.

## 55-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Sub la Alta Protektado de D-ro Franz JONAS, Prezidanto de Aŭstrujo. WIEN de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1970-a. Nieuwe Binnenweg 176 ROTTERDAM.